

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1991 — 4

(OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi legos pri...



... Vinfarado en Anĵu ...



... Kaj reĝino Izabela el Bavarujo

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Vinfarado en Anĵu (B. Cheverry)	3-4
Kunkuŝe kun reĝinoj (S. Boniol)	5-6
Lemurio (fino) - (E. Motillon)	7-8
Movadhistoriaj eventoj(B. Golden)	9-10
La uzuristo Gobseck (H. de Balzac) (trad. G. Prevot)	11-13
Por via distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

La programo de niaj aktivaĵoj por 1992 jam aperis meze de novembro, kaj estis sendita al la gazetoj naciaj kaj internaciaj, al la radio-stacioj, al Federacioj en Francio kaj eksterlanden. Jam alvenis informpetoj. Kia estos la venonta somero? Sukcesa? Espereble, jes.

Despli, ke denove ni enŝovis en la programon tiujn artajn manlaborojn, kiuj plaĉis antaŭ pluraj jaroj. Pro manko de gvidantoj ni estis devigataj rezigni pri tiu pluso. En 1992, Daniel Moirand instruos la bindadon de libroj kaj konsilos tiujn, kiuj jam "iom bendis", por ke ili perfektiĝu. La interesatoj alportu bindotaĵojn aŭ aĉetos librojn surloke.

Dum la lastaj du semajnoj de aŭgusto Juanita Turbillon instruos korbofaradon. La kursanoj povos kunporti hejmen artajn rotangaĵojn faritajn de ili mem. Espereble tria arta okupo estos proponita al la ĉeestantoj: foto-arto. Ni atendas la respondon de amiko, kiu povos revivigi la valoran foto-laboratorion, kiun ni instalis antaŭ pluraj jaroj sed longe dormis poste. Tiamaniere la laboremuloj trovos okupon utilan kaj interesan ankaŭ dum la posttagmezo

Petu nian programon se vi ankoraŭ ne ricevis ĝin. Sendu ĝin al geamikoj. aŭ skribu al ni donante adresojn de korespondantoj, al kiuj ni mem sendos informojn. Dankon, kaj ĝis!

****

NI FUNEBRAS

Fine de novembro du tre malĝojigaj informoj trafis nin.

Lina, la edzino de nia kara amiko Pierre Metivier forpasis. Samperiode mortis ankaŭ Marcelle Turin, alia tre fidela amikino. Al Pierre Métivier, al la infanoj de Marcelle Turin ni sendas niajn elkorajn kondolencojn.

Esperanto tra la Mondo

ESPERANTO KAJ KOMERCO- Laŭ iniciato de Scienca-Teknika Esperanto-Asocio de Ĉinio kaj aranĝo de la Juna Ekonomia Ĉambro de Oostende (Belgio), okazis en tiu urbo esperanto-simpozio "Ĉinio aktiva", kun ekspozicio preparita de 120 ĉinaj firmaoj, kiuj serĉas komercajn kontaktojn en Eŭropo. Krome prelegis pluraj specialistoj de la internacia komerco.

La rezulto estis tre bona. S-ro Kees Ruig, konsilisto de la Komerca Ĉambro de Nijmegen (Nederlando) asertis:"La esperanto-movado forgesis, ke ekonomio estas la motoro de la socio. Nun vi, ĉinaj komercistoj, malfermis epokon de praktika uzado".

Ankaŭ en Belgio, en okcidenta Flandrio, granda asocio de et-entreprenistoj eldonis kaj distribuis al siaj membroj gvidlibron en ses lingvoj, inkluzive esperanto. En la libreto troviĝas utilaj frazoj por la priservado de alilandaj klientoj.

Komencis aperi nova gazeto ankaŭ por komercaj rilatoj; temas pri "Monda merkato", tutmonda bulteno kun anoncoj de entreprenoj kaj privataj personoj. Petu provnumeron al Linguistisches Bureau Alfred Schubert, poŝtfako 1539, W-8120 Weilheim, Germanio.

KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ- SAT-kongreso de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1992 en Kaunas (Litovio).

Kongreso por pliaĝuloj de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto en Augsburg (Germanio). Inf. BEL, Waterloostrasse 21, D-W-8900 Aŭgsburg.

Antaŭkongreso de la UK de UEA, en Prago (Ĉeka Esperanto-Asocio, Jilska 10, CS-110 00 Praha 1.

1-a Mondkongreso de Esperantistoj-Handikapuloj, Františkovy Lázně, Ĉeĥoslovakio.

Eŭropa Kongreso de Esperanto, 5-10 de junio 1992 en Verona (Italio) Organiza komitato: Vicolo Ghiacciaia 3, I-37122 Verona.

Internacia kongreso de la fervojistoj en Münster (Germanio)

Kaj ne forgesu peti la programojn

EL BULGARIO- Dudeko da studentoj de la Pedagogia Instituto en Vraca ekstudas interlingvistikon en dujara kurso, kiu inkluzivas ankaŭ lingvan kibernetikon kaj la fundamenton, historion, literaturon kaj metodikon de esperanto. Post ŝtata ekzameno, la sukcesintoj ricevos la kvalifikon " instruisto de esperanto ".

EL MONGOLIO- Oni anoncas en Mongolio pretigon de lernolibro, de vortaro kaj la projekton de trimonata literatura revuo: "Eterna ĉielo".

UN-KONFERENCO PRI MEDIO- La brazilaj esperantistoj antaŭvidas la aranĝon de ekspozicio pri esperanto okaze de la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri la Medio kaj la Evoluigo, en 1992 en Rio-de Janeiro

EKOLOGIO- Progresas la laboro por verko de baza Ekologia Terminaro en pluraj lingvoj, sub la kunordigo de la UEA-fakdelegito pri ekologio Lev Medvedev.

ESPERANTA UNESKO-ASOCIO- Dum la universala kongreso en Bergen estis fondita " Monda Agado por Eduko, Scienco kaj Kulturo ". Tiu asocio celas peradon inter la esperanto-movado kaj Unesko, en formo de konkretaj internaciaj projektoj.

KOMUNIKADO EN EŬROPO- Estis eldonita broŝuro " Komunikado en Eŭropa Komunumo 1992 ", kiu estas dokumenta bazo por nova kampanjo ĉe eŭropaj parlamentanoj. La broŝuro, kiu post revizio estos tradukita en la naŭ lingvojn de la Komunumo, estas havebla ĉe UEA (4,50 gld). Eŭropaj funkciuloj partoprenis en la redaktado de la dokumento.

GRAVA ELDONAĴO- Aperis "Nova Esperanta Krestomatio". Tiu riĉenhava bindita libro, redaktita sub la respondeco de W. Auld, celas esti la tutmoderna sekvo de la "Fundamenta Krestomatio" de Zamenhof (1903). Ĝi alportas vastan panoramon de la stato de nia lingvo en 1991

Vinfarado en Anĵuo

Ne ĉiuj eksterlandanoj, eĉ ne ĉiuj Francoj, konas tiel bone la Anĵuajn vinojn, kiel la bordozajn kaj la burgoniajn. Tamen de tre longe vitejoj ekzistis en tiu provinco. Plurajn jarcentojn antaŭ Kristo, en la galla epoko, jam kreskis la vitaroj, kiuj pli etendiĝis komence de la romania koloniado ĝis kiam iu Romia imperiestro dekretis detruon de la gallaj vitejoj por privilegii la vinojn de Italio. Feliĉe, du jarcentojn poste, alia imperiestro nuligis la dekreton kaj permesis novan kreskadon de la vitejoj en la valo de Loire. Spite al pli postaj tumultoj, disfalo de la Romia Imperio kaj invadoj de barbaroj, vit-kultivado prosperas dank'al monaĥoj plej ofte disĉiploj de Sankta-Marteno de Tours. Tiuj ĉi grave agadis, ne nur sur religia kampo, sed ankaŭ kiel pioniroj pri ter-kultivado kaj vin-eksperimentado sur konvenaj grundoj. Ili bezonis vinon por celebri di-kulton, por oferdoni al vizitantoj, el ĝi krei iajn kuracilojn, ĉefe alkoholon, kiu tre utilis por flegi vundojn. Ankaŭ kompreneble por persona konsumado kaj profitplenaj interŝanĝoj! Sekve, en Anĵu, kiel en aliaj lokoj, ĉiu monaĥejo havis proprajn vitejojn laŭ teritoriaj donacoj de provincaj estroj.

La surtroniĝo de la "Plantagenets" samtempe grafoj en Anĵu kaj reĝoj en Anglujo, malfermis al la anĵuaj vinoj novajn merkatojn kaj komencon de eksternacia famo kaj komercado. Jam en la Mezepoko ekzistis diversaj vin-korporacioj kaj ĉe la fino de la feŭda epoko, do ĉe la sojlo de la Franca Revolucio, vino konsistigis unu el la ĉefaj riĉaĵoj de la provinco. Ve! En 1789 la vintro estis aparte malvarma. Vitejoj frostiĝis. La nord-orienta parto de Anĵu rezignis pri replantado. Samepoke la tiel nomitaj "Vendeaj militoj"detruis la departementan ekonomion sude de Loire, aparte en la regiono de Cholet, kie oni preferis investi en bov-bredado kaj loka industrio.Tamen, sur la plej konvenaj kaj fruktodonaj lokoj, oni daŭrigis, eĉ ampleksigis la vinber-ekspluatadon. Ve! denove atakas nova plago, ĉifoje bakteria. Temas pri filoksero, tiu perfida insekto, kiu rezistis al ĉiuj sulfuraj kombinaĵoj. Estis nur unu solvo: elradikigo de la vitoj kaj plantado de amerikaj specoj. Tamen la kultivantoj ne malesperis kaj dudek jarojn poste la anĵua vitejaro estis restarigita, sur preskaŭ 40 000 hektaroj en 1912.Okazis la unua kaj la dua mondmilitoj, kiuj alportis diversaspektajn perturbojn en la vivo kaj produktebloj de la rikoltantoj. Tamen intertempe modernaj teknikoj evoluis, kiuj alportis gravajn ŝanĝojn en plej diversaj fakoj de kultivado, rikoltado kaj vendado de la vino. Pli kaj pli da vitejoj estis grupigitaj sur plej konvenaj lokoj, ĉefe sur la sudorientitaj montetoj borde de Loire kaj ties flank-riveroj, sur surfacoj pli ampleksaj. Konsekvence modernaj maŝinoj anstataŭis multnombrajn laboristojn. Dum jarcentoj vinkulturado estis nur homa, antaŭ la uzado de plugiloj tirataj de bovoj aŭ ĉevaloj. Ek de la jaro 1950 oni komencis uzi traktorojn kaj, paralele, kemiaĵojn por senpere detrui herbojn, aliajn por anstataŭi naturajn sterkojn, ankaŭ modernajn mekanikajn aparatojn por uzado de plej ellaboritaj rimedoj kontraŭ vinber-malsanoj. Lasta modernaĵo: la rikoltmaŝino.

Kompreneble tiaj evoluoj postulis ŝanĝojn ankaŭ pri la maniero planti kaj prizorgi la kreskadon de la rebo-branĉoj. Nur la pritondado de la vitoj, kiu okazas vintre aŭ printempe, daŭre restas submetata al peniga, sperta kaj specife homa laboro. Sed, spite al konstantaj zorgoj, neniu ĝis nun povis regi la veteron, kaj malfruaj frostoj, hajlofaloj, fulmotondroj povas subite, senrimede detrui la rikoltojn.

Kiuj estas tiuj vinber-kultivistoj? Ĝis nun la ter-posedantoj kaj la salajritoj iris la saman vojon, ĉar jam tre junaj ili estis kunligitaj de la zorgoj kaj ĝuoj

pri vinberkultivado kaj vinprizorgado. En Anĵu, kiel en aliaj lokoj verŝajne, la vinber-prizorgantoj, posedantoj aŭ ne de la vitejoj, konsideras sin superuloj en la agrikultura fako. Promenante tra la Anĵû-regiono, oni povas miri pri la granda diverseco de la loĝejoj, la imponeco de kelkaj, kvazaŭ kasteloj. Ankoraŭ pli tipaj estas la keloj mem. En la regiono de Saumur la keloj, profunde fositaj en la tiea kalka tufo, profitas de aparta avantaĝo: tie la interna temperaturo restas praktike senŝanĝa tra la sezonoj. Tute malsimile, en aliaj partoj de Anĵu la keloj estis konstruitaj sur la grundonivelo aŭ ne tre profunde. Ili estas submetitaj al temperaturaj variadoj, kiuj postulas tute apartajn prizorgojn. Iom post iom fondiĝis vin-kooperativoj, kie estas pritraktitaj la vinberrikoltoj de la ĉirkaŭaĵo.

Vinfarado, de la rikolto ĝis la enboteligo, postulas multajn zorgojn. Dum longa tempo, por eltiri la sukon el la freŝe rikoltitaj vinberoj, tiujn oni metis en lignajn tinegojn en kiuj nudpiedaj homoj tretis ilin. La suko, aŭ mosto, iris al kuvo tra suba dren-krano. En Anĵu mekanikaj vinber-premiloj estis uzataj nur ek de 1920. La akirita mosto postulas rapidan ektransformadon por iĝi perfekta nedifektebla trinkaĵo, do bezonas enkuvan fermentadon pli malpli longan laŭ la atingota celo. Efektive, belkolora ruĝa vino postulas iom longan most-fermentadon, sed blanka vino el blankaj vinberoj postulas rapidan premadon de la beroj kaj tujan enbareligon. La roz-kolora vino, el ruĝaj vinberoj, postulas saman rapidan pritraktadon. Poste okazas transverŝadoj el bareloj, en kiuj restas la feĉo, en aliajn ege purajn. Iom post iom tiu fazo de vin-farado fariĝas pli scienca, kun uzado de specifaj iloj por mezuri la entenatajn proporciojn de sukero, alkoholo, acideco. Vinkeloj fariĝas kvazaŭ laboratorioj en kiuj regas perfekta higieno de la ujoj kaj de la loko mem. Eventuale okazas suker-aldono por kompensi mankon en la mosto, aŭ alporti al ili plian rezistadon fronte al vetera malvarmo. Povas okazi, ke iuj produktantoj tiamaniere kompensas mankon en la kvanto aŭ la kvalito. Pro tio leĝoj limigas la uzadon de suker-aldono kaj severaj kontroloj okazas.

La Loire, longa navigebla riverego, kaj ĝiaj alfluantoj, multe faciligis la komercadon de tiuj vinoj, kaj ebligis interŝanĝojn de varoj tra granda parto de la lando kaj eĉ eksterlanden. Jam en la 16-a jarcento Belgoj kaj Nederlandanoj transportis vinojn perŝipe al sialandaj havenoj. Dum longa tempo la vino estis transportata en lignaj bareloj kaj enboteligata de la aĉetantoj, iom anonime. Nun severaj leĝoj devigas la revendistojn kaj produktantojn glui sur la botelojn etikedojn indikantajn la originon, la kvanton, la alkoholvolumon, la nomon kaj adreson de la enboteligintoj.

Preskaŭ tute malaperis la barelfabrikantoj. La lignoj de akacio, kverko kaj kaŝtanarbo estas anstataŭitaj de betono, vitraj fibroj, plastaĵoj Ĉu la vinkvalito suferis pro tiuj ŝanĝoj? Oni asertas, ke ne. Fakte modernigado enkondukis pli profundajn esplorojn pri kreado de novaj plantspecoj, kaj ankaŭ pri la gustoj de la klientaro. La necesa formado de kompetentaj gejunuloj kondukis al la kreado de specifaj lernejoj. Ĉu la konsekvenco estis definitiva adiaŭo al la antaŭaj vin-ritoj, labor-metodoj, kutimoj? Ne tute. Vin-muzeoj elmontras ilin kaj folkloraj festoj revivigas la antikvajn vinkorporaciojn. En Anĵu la plej fama estas la "Sacavins" (vinsakoj), kies patrono estas la fama franca verkisto de la 16-a jarcento Rabelais, kiu laŭdire tre ŝatis la vinojn de sia naskiĝ-regiono. Ankoraŭ nun poetoj prikantas la vinon, sciencistoj laŭdas la vin-efikojn. Sendube vino favoras hom-kontaktojn, eĉ inter nekonatuloj, kaj faciligas interkomunikadon. Ĝi redonas afablecon kaj gajecon al tiuj, kiuj perdis ilin. Sed, kondiĉe, ke oni ne tro uzu ĝin!

Bérengère Cheverry

Kunkuŝe kun du reĝinoj (2)

Izabela el Bavarujo, reĝino de Francujo-

Ŝia nepo, Ludoviko la II-a titolos ŝin "granda putino",... sed en la itala lingvo, kio malkrudigas la senrespektan aserton. Tamen estas pura vero, ke ŝi kvazaŭ pelis Francujon abismen kaj la fiaĵon eĉ ne prikonsciis.

Sed kiu kaj kia estas ŝi? Germanino (la germanan parolmanieron ŝi konservos la tutan vivon), filino de Stefano la juna, duko de Bavarujo (Wittelsbach familio), kaj Taddea Visconti. Duobla peza heredeco influas Izabelan: la patrin-flanka avo estas taksata la plej kruela, malsincera kaj diboĉa homo el tuta Eŭropo. Kiam la onkloj de Karlo la 6-a ektraktas kun duko Stefano pri la dezirinda geedziĝo de la kronprinco kaj Izabela, la ofendita patro nete rifuzas, ĉar li ne povas konsenti, ke akuŝistinoj laŭkutime esploru la virginon por certiĝi, ĉu ŝia korpo taŭgas por naski infanojn. Sed la dukino de Brabanto, lerta svatistino, aranĝas la aferon kaj estas decidite, ke la estontaj gefianĉoj laŭ ŝajna hazardo interkonatiĝos okaze de pligrimado al Amiens. La franca fama kronikisto Froissart raportas pri la rapidfarita nuptofesto. Enamiĝinta estas la geedza paro kaj se sensperta estas Izabela, Karlo de la 12-jara aĝo estas amorlertulo. Fakte tempon ili disponas por amorĝuadi ĉar reĝadas ne Karlo, sed regentaro konsistanta el kvaropo de fiaj onkloj, "la liliofloraj princoj" laŭnome. El inter ili distingiĝas la famkonata Filipo el Burgundio, kromnomata "la sentimulo" ĝuste tiu, kiu dum la batalo en Poitiers avertis Johanon la bonulon: "patro, gardu vin dekstre...patro, gardu vin maldekstre...".

Dum la unuaj ses jaroj normalan reĝinvivon ĝuas Izabela; disvolviĝas kortegaj festoj kaj ĉasaventuroj. Kvin fojojn ŝi gravediĝas: 12 gereĝidojn ŝi sume donos al sia edzo. Sed en 1392 komenciĝas la martireco de la reĝo, kiu daŭros ne malpli ol 30 jaroj. Post du fortaj nervoskuoj, en arbaro apud Le Mans kaj okaze de maskobalo, la kompatinda Karlo sinkas en plenan frenezon kun intermitaj, pli kaj pli maloftaj, rekonsciiĝoj ege doloraj. Izabela estas senprokraste delogata de la duko Ludoviko el Orléans, jam prezentanta la karakterizojn de renesanca princo. En la nobeldomo, kiun ŝi konstruigis al si por ŝirmi sin de la edza frenezeco, la geamantoj senbride diboĉadas. Ho ve! Tre ofte okazas, ke Karlo ŝin ne rekonas, eĉ pelas for kaj provas bati. Kaj plorkantas Eustache des Champs pri lando senigita je sia reĝo:

"Malforta, ve! ve! en konfuz' kaj dramo!
Amikoj raras, mankas eĉ sinjor'.
Brilegis iam ĉien mia famo:
Memstara, riĉa, inda je honor';
Hodiaŭ plenplenadas mi je plor':
Jen sklava jam! kvazaŭ mi ruino,
Senrajte subiĝanta je rigor'.
Nu, kia sort' por la mirplendulino?"

Izabeau (tiel sonas la nomo en la franca) amasigas konsiderindajn monsumojn...kaj korpan grasaĵon, kiu tiom dikigas ŝin, ke fine de sia vivo ŝi ne plu povos piedmarŝi kaj uzos rulfotelon por iradi tra la ĉambroj de sia nobeldomo. Sed tio ne malhelpos ŝian partoprenon en la tie disvolviĝantaj orgioj. La iama brunulino jam rufiĝis kaj ŝia konfuzoporta beleco malbonaŭgure ensorĉas.

Jen ensceniĝas la filo de Filipo el Burgundio: Johano la netimigebla, viva antitezo de Ludoviko el Orleans; cetere homo tute senskrupula kaj monavida, kiu Francujon elpumpas por Burgundion riĉigi. Li ordonas, ke Ludoviko estu murdata. Kaj tiel komenciĝas la priplorinda kverelo inter du tutpotencaj klanoj, kies mortoporta rivaleco malfermos la landon al la Angloj. Sed Izabeau tutunue pensas pri sia propra sekureco. La nova mastro de Parizo estas ja tiu Johano, kiu kapablis ligiĝi kun la korporacioj. Por ke la orrivero ne ĉesu fluadi al ŝi, Ludovikon

ŝi anstataŭigas en sia lito per Johano, des pli, ke ĉi lasta ne estas postulema kaj tiom da amorantoj toleras, kiom plaĝas al ŝi. En la brakoj de aliaj tri ŝi forgesas, ke la reĝo de Anglujo estas en Francujo endomiĝanta. Kial, tiu okaze, ne fari el li baldaŭan bofilon?

Tamen en 1417 la stato de la frenezulo iom pliboniĝas. Ekkoninte la edzinan konduton kaj reĝolandan situacion li furiozas kaj decidas tuj rajdi al Vincennes. Lin akompanas la konestablo, kronprinco (la estonta Karlo la 7-a) kaj pariza preposto. Karlo ordonas, ke oni arestu la reĝinan amordonanton, lin strangolu, kunkudru en leda sako en Sejnon ĵetota. Sed, ho ve! frenezeco reenkaptas Karlon kaj lia menso denove sinkas en mallumegon.

Sed furiozas ankaŭ la kronprinco. Post drastega interdiskuto kun la patrino (Izabeau taksas lin filo de frenezulo), li decidas ekagi. Laŭ lia ordono la reĝino estas forprenata, kondukata ĝis la urbo Tours, kie oni kvazaŭ enŝlosas ŝin.Sed ŝi sukcesas averti Johanon, kiu ŝin liberigas. Ek al Parizo... Ŝi nepre supervenku la filon! Fakte ĉi lasta devas sin ŝirmi en Angers, post la muregoj de la kastelo, proprajo de lia samtempa onklino kaj bopatrino.

Laŭ la packontrakto en Troyes subskribita, Izabeau fordonas Francujon kune kun la krono de la antikvaj Kapetidoj al Henriko la 5-a, tiama reĝo de Anglujo. Ŝi ne hontas aserti la bastardecon de sia filo kaj eĉ devigas la frenezan edzon alsubskribi la fian dokumenton.

Pasas kelkaj jaroj. Dume Izabeau daŭrigas pli kaj pli malnobligan dibočadon, eĉ kun la unuaj renkontitoj. De tempo al tempo, kiam revenas al la reĝo iom da sana prudento, kelkaj ledaj sakoj peze defalas en Sejnoriveron...

La 21-an de oktobro 1422 en sia sankta-paŭla nobeldomo mortas la kompatinda frenezulo, filo de saĝulo. Lia morto kaj la reĝolanda sorto tiras larmojn el la popolo. Ĉar la anglaj soldatoj estadas en Parizo nome de la nepo de Izabeau, la dekmonata Henriko, reĝo de Anglujo.

Sed venas por la reĝino la punotempo. Nur malaltan pension ŝi ricevas de regento Bedford kaj ŝi malgaje vagadas tra la neloĝataj ĉambroj de sia palaco. Konscienc-riproĉoj ne turmentas ŝin. Tamen kelkajn larmojn ŝi elverŝas, kiam la unuan fojon ŝi vidas sian nepon Henriko. Mortas Parizo pro malsato kaj hurlas la lupoj ĉe ties pordegoj. El 300 000 loĝantoj postrestas malpli ol kvarono!

En la jaro 1435 forpasas reĝino de tuta popolo abomenata. Sed post la tempo de senhontulino baldaŭ venos la tempo de liberigo, la tempo de virgino pli noblanima ol multaj reĝinoj.

Simonne BONIOL

****

SUPREN

Ĝojas, ĝojegas la tuta naturo,
Ridas, ridegas la sun' kun plezuro.
Flugas nun supren, pli supren animo,
Ĉiam kuraĝe, kuraĝe, sen timo.

Kial ne serĉu ĝi vojojn senbarajn,
Kaj ne forĵetu la pensojn amarajn,
Pensojn sensencajn, humoron mucidan,
Kaj ne aspiru la flagon senbridan?

Eĉ ne turniĝos la kap' en la alto,
Ĉiam pli supren rapidu sen halto,
Banu en ora sunlum' la animon,
Ĝuu plenspire la sferan pilgrimon.

Sciu: eterne la flugo ne daŭros,
Baldaŭ sur tero ja ree vi kaŭros,
Kaŭros en kot' kun rompita flugilo,
Plena je svena, nevola humilo.

Sed nun antaŭen sen vana cerbumo,
En la sunbrilon kaj al la stellumo,
Por ke eterne vibradu en koro
Pri la etera flugad' la memoro.

Hilda Dresen (1928)

LEMURIO

AŬ KONTINENTO DE MU

...Ni havas malmulte da informoj pri ilia industrio.Oni trovis plimalpli fragmentajn desegnojn kaj planojn de maŝinoj, sed ne eblas kompreni ties celon kaj uzadon. Ŝajnas, ke ili kaptis kaj utiligis la sunan radiadon. Ili disponis potencajn lumigilojn publikajn kaj privatajn. Ili kuiris per aparatoj similaj je niaj elektraj kuirfornoj. Tamen oni ne trovis uzinojn similajn je niaj elektraj centraloj. Iliaj aviadiloj forme malsimilis la niajn kaj estis senbruaj. Ili konis la navigadon per veloj kaj per maŝinoj. Oni trovis motorojn similantajn niajn eksplodmotorojn; ŝajne, ili ne uzis vaporon. Ni do povas konkludi, ke ili posedis fontojn de energio nekonatajn de ni.

La ekspluatado de mineraloj estis tre disvolvita, ĉu per eksteraj minejoj, ĉu per subteraj. Krom la konstruŝtonoj ili utiligis kelkajn mineralojn por celoj de ni ne konataj kaj nekompreneblaj. Oro kaj arĝento tre abundaj en kelkaj lokoj neniam estis uzitaj por komercaj aŭ financaj interŝanĝoj. Ili estis uzitaj nur por delikataj meĥanismoj aŭ por faro de artaĵoj kaj simbolaj juveloj, kaj por ornamo de konstruaĵoj. Same por la gemoj, al kiuj ili atribuis nenian specifan valoron.

Por la interkomunikoj ili havis tre belajn vojojn sur kiuj cirkulis veturiloj tirataj de bestoj similaj je kameloj. Estis ankaŭ senradaj veturiloj, probable veturantaj sur aertavoloj. Ni ne scias ĉu ili havis ion similan je nia telegrafo kaj televizio. Sed ili havis psikan disvolviĝon apenaŭ koncepteblan de ni. Telepatiaj komunikoj eĉ granddistancaj estis konstante uzataj. Stranga fizika apartaĵo kredigas, ke ilia pineala glando estis eksterordinare kreskinta. Temas pri tre videbla tubereto supre kaj meze de la frunto.

Tre probable, ili uzis la nuklean forton. Sed male je nia uzado, ne laŭ maniero negativa kaj detrua, sed laŭ maniero pozitiva kaj konstrua, per sintezo de la atomo.

Tiu nuna homa raso, tuj kiam ĝi estis sufiĉe nombra kaj civilizita, eble antaŭ 100 000 aŭ 150 000 jaroj, sendis migrantojn por loĝigi ĉiujn loĝeblajn partojn de la tero. Pro du ĉefaj kaŭzoj. La pliiĝo de la loĝantaro necesigis la kreadon de novaj loĝocentroj. La kontinento tute ne havis tian eblecon sur sia tuta surfaco. En kelkaj regionoj, la vulkana aktiveco estis konstanta kaj intensa. Ĝi ankoraŭ ekzistas en la " Fajra zono de PAcifiko". En aliaj lokoj Lemurio estis surkreskita de densegaj praarbaroj, aŭ surportis vastajn kaj profundajn marĉojn. Tie svarmis la prahistoriaj gigantaj animaloj. Oni ne forgesu, ke la Lemurianoj estis samtempuloj de tiuj teruraj antaŭdiluvaj bestoj , kies skeletoj estis trovitaj en la tero. Tiaj bestegoj vivis sur la tero, en la maro, en la aero. La dinosaŭroj estis ĝis 30 metrojn longaj kaj pezis plurajn tunojn. En la aero flugis pterodaktiloj, aliaj flugbestoj kaj gigantaj birdoj. Iu aglo havis dekmetran enverguron. En la maro la pleziosaŭro aŭ marserpento, la prapatroj de la balenoj, ne estis malpli volumenaj. La insektoj eksterordinare kreskis. Fosilioj de formikoj aŭ ties prapatroj estas longaj ĝis dek centimetroj. Malgraŭ ĝia vasta etendiĝo, la kontinento Mu tute ne estis loĝebla sur sia tuta surfaco. Krome, oni povas kredi, ke la kleraj Lemurianoj antaŭvidis la estontajn kataklismojn, kaj eble eĉ la malaperon de la kontinento.

Do, la Lemurianoj kreis koloniojn ĉie, kie ili trovis loĝeblajn terojn. Ili popolizis Hiperboreon, nun kuŝantan sub la glacioj de la Norda Poluso, kelkajn partojn de Azio, kiel ekzemple Siberion, kiu entenas milojn da neesploritaj tomboj, kaj estis la legenda imperio de la Ŭiguroj. Antaŭ proksimume 50 000 jaroj, Atlantiso post sia leviĝo, fariĝis la rifuĝejo de nekonata nombro da Lemurianoj; ĉar je tiu epoko, ilia patrujo parte submariĝis, kaj detruiĝis

granda parto de la popolo. La civilizo alportita en Atlantiso de la eskapintoj disvolviĝis kaj atingis sian klimakson antaŭ eble 18 000 jaroj, kaj detruiĝis post ĉirkaŭe 6 000 jaroj pro la "Universala Diluvo".

La rapideco kaj amplekso de la katastrofo ebligis nur al tre malmulte da Atlantisanoj eskapi. La popoloj aŭ triboj, izolitaj sur la supro de montoj, sur insuloj, estis senigitaj de ĉiuj vivrimedoj kaj devigitaj dediĉi siajn tutajn fortojn al malfacila postvivado. Kelkaj regresis kaj fariĝis tiuj de ni nomataj "sovaĝuloj" aŭ "primitivuloj". Aliaj malmultaj sukcesis rifuĝi en kavernoj aŭ grotoj. Inter ili estis sendube kelkaj inicitoj je la altaj sciencoj de Atlantiso kaj Lemurio. Devigitaj unue prizorgi sian postvivon, senigitaj je ĉio, sen laboriloj, sen instrumentoj, ili devis starigi novan homaron kaj novan civilizon. Ili estas la konstruintoj de la megalitaj monumentoj misteraj kaj imponaj, kaj la verkintoj de la admirindaj surrokaj desegnoj kaj pentraĵoj kaj de la skulptitaj rokoj ĉie troveblaj en la mondo.

Reale, la Atlantisaj eskapintoj estas niaj ĵusaj prapatroj. Egiptujo pro sia proksimeco estis ilia plej grava kolonio. Tie ili alportis sciencon kaj civilizon, kiuj estas la fundamentoj de nia nuna mondo. Iliaj sekretoj ne diskoneblaj al ne sufiĉe evoluinta popolo, estas ankoraŭ ne tute malkaŝitaj. Ili ne perdiĝis, sed ĉiam daŭradis en



formo de esotera kaj sekreta tradicio, ĝis nun vivanta en la inicaj societoj naskiĝintaj el la Egiptaj "Lernejoj de Misteroj". Iom post iom tiu kaŝita scienco malkaŝiĝas. La nova erao ĵus komenciĝinta ebligas, ke ni esperu pli rapidan evoluon de la homaro al ĉiam grandiĝanta progreso.

Eloi Motillon



KULTURAJ KAJEROJ

deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn tagojn dum la venonta jaro.

Movadaj eventoj ekster Eŭropo

Lastatempe oni parolas pli kaj pli pri ekstereŭropigo de la Esperanto-movado. La sekvaj dek demandoj temas pri organizaj kaj kulturaj eventoj, kiuj okazis for de Eŭropo en dek diversaj urboj. Ĉu vi povas diveni la nomon de ĉiu urbo? Kaj ĉu vi povas trovi la komunan elementon, kiu kunligas ĉiujn okazintaĵojn?

1- En 1888, nur unu jaron post la apero de la "Unua Libro" de D-ro Zamenhof, prestiĝa scienca organizaĵo, malaprobinte Volapukon, interesiĝis pri Esperanto kaj eldonis publikigaĵojn pri ĝi. Kiel nomiĝas la societo kaj kiu urbo estas ĝia sidejo?

2-En 1899 Wilhelm H. Trompeter, unu el la eminentaj pioniroj de la germana Esperanto-Movado vojaĝis al fora transmara lando, kie li renkontiĝis kun Richard H. Geoghegan, la unua brita esperantisto. Kie okazis tiu renkontiĝo?

3-Prof. Wilhelm Ostwald, fama germana kemiisto ĉe la Universitato de Lejpcigo kaj Nobel-premiito (1909), faris propagandon por Esperanto dum la lerneja jaro 1905-1906, kiun li pasigis kiel gastprofesoro ĉe bone konata eksterlanda universitato Kiel nomiĝas la universitato, kaj en kiu urbo ĝi troviĝas?

4- La unua traduko en Esperanton de la "Komunista Manifesto" de Karl Marx kaj Friedrich Engels aperis en 1908. Kiu tradukis ĝin kaj en kiu urbo ĝi estis eldonita?

5- La Internacia Somera Universitato (ISU) fariĝis parto de la programo de Universalaj Kongresoj de Esperanto la unuan fojon en 1925 ĉe la 17-a Kongreso en Genevo. La iniciatinto de ISU estis Edmond Privat, kiu ricevis la ideon pri ĝi dum eksterlanda preleg-vojaĝo en 1908. Kie li estis?

6- Kie okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto en ekstereŭropa lando?

7- La 10-a Universala Kongreso ne povis okazi en Parizo en 1914 pro la eksplodo de la unua mondmilito. La sekva kongreso estis aranĝita ekster Eŭropo. Kiu urbo gastigis la malmultajn esperantistojn, kiuj povis ĉeesti la 11-an UK en 1915?

8- La unuaj radio-disaŭdigoj en Esperanto okazis en 1922 en du malproksimaj urboj. Unu el tiuj urboj estis Londono. Kiu estis la alia urbo?

9- Jozefo Silbernik, unu el la bofratoj de d-ro Zamenhof, elmigris el Eŭropo kaj ekloĝis en granda urbo, kie li fariĝis delegito de UEA. Kiel nomiĝas la urbo?

10- Jam estis menciitaj en tiu ĉi demandaro du ekstereŭropaj Universalaj Kongresoj. Ankaŭ en 1972 multaj kongresanoj devis vojaĝi al alia kontinento. Kie estis organizita la 57-a UK?

****

Respondoj: Ĉiuj urboj troviĝas en la sama lando: Usono.

1- En 1887 la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio nomumis komitaton por esplori la internacilingvan demandon. La komitato ne akceptis Volapukon, kaj en suplementa raporto prezentita en 1888 favoris Esperanton. En 1889 la Societo eldonis anglan tradukon de la "Unua Libro".

2- W.H. Trompeter (1839-1901) vizitis R.H. Geoghegan (1866-1943), kiu post elmigro el Britio en 1891, loĝis en la urbo Eastsound sur la insulo Orcas en la ŝtato Ŭaŝingtono en la okcidenta parto de Usono.

3- Prof. Wilhelm Ostwald (1853-1932) prelegis ĉe la Universitato Harvard en Kembriĝo, Masaĉuseto. Kvankam li daŭre apogis la ideon de internacia lingvo, li ne longe restis en la Esperanto-movado, sed turnis sin al aliaj planlingvoj.

4- En 1908 en Ĉikago aperis 65-paĝa libreto kun la titolo "Manifesto de la Komunista Partio". La tradukinto estis Arthur Brooks Baker (1877-1973) el Kalifornio, aktivulo en la frua Esperanto-movado en Usono.

5- En 1908 Edmond Privat (1889-1962) ĉeestis la unuan usonan Esperanto-kongreson ĉe la lago Chautauque en la okcidenta parto de la ŝtato Nov-Jorko. En tiu fama somerumejo estis aranĝitaj prelegserioj pri diversaj temoj, por ke la vizitantoj ne nur ripozu sed ankaŭ edukiĝu.

6- La 6-a Universala Kongreso okazis en 1910 en la ĉefurbo de Usono, Ŭaŝingtono.

7- La 11-a Universala Kongreso estis organizita de D.E. Parrish en Sanfrancisko, Kalifornio. La 163 ĉeestantoj estis usonanoj kaj kanadanoj.

8- Dum britoj aŭdis Esperanton tra la etero de Londono, samjare, en 1922, usonanoj apud la urbo Newark en la ŝtato Nov-Jerzejo kaptis eksperimentajn programojn de la sendostacio XYZ.

9- Jozefo Silbernik (1850-1925) esperantiĝis en 1891 kaj post enmigro en Usonon funkciis, kiel UEA-delegito en Nov-Jorko.

10- 923 kongresanoj ĉeestis la 57-an Universalan Kongreson en la okcident-usona urbo Portlando en la ŝtato Oregono.

Bernard Golden

****

AFRIKA POPOLRAKONTO

tri vortoj

Iam estis sultano, kiu loĝis en urbo. Li kunvokis ĉiujn homojn, kiuj loĝis en la urbo kaj parolis al ili:" Mi deziras, ke vi respondu al mi tri demandojn."

La homoj demandis:" Do, kion vi deziras?"

Li parolis:" Malsato venis sur la urbon. Poste ĝi malaperis. En kiu domo ĉiam estas malsato?"

" Due, estis universala malsano, kaj la malsano siavice malaperis. En kiu domo daŭre estas malsano?"

" Trie, estis milito, kaj la milito siavice finiĝis. En kiu domo eterne estas milito?"

La homoj en la urbo ne scipovis respondi. Li demandis ĉiun, sed estis neniu tie, kiu komprenis tiujn vortojn. La sekvan tagon viro diris:" Troviĝas maljunulo. Li ne estas nun tie ĉi inter ni. Li scios. Ni alvokos lin." Ili foriris alvoki lin.

Kiam li venis, ili demandis lin kaj li respondis: " Estas malsato kaj la malsato malaperis. Domo, kiu ĉiam havas malsaton estas la domo de maldiligenta homo."

" Estis malsano ĉie, kaj la malsano siavice malaperis. Domo, kiu ĉiam konservas malsanon estas la domo de maljunulo."

" En urbo eksplodis milito, kaj la milito siavice finiĝis. Domo kun konstanta milito estas la domo de viro, kiu havas du edzinojn."

Kiam la sultano aŭdis tiujn ĉi vortojn, li parolis:" Efektive, viaj vortoj estas veraj."

Tradukita de B. Golden

LA UZURISTO GOBSECK

La uzuristo rakontas: la unua bilo, mil franka, prezentita de junulo, bela elegantulo kun veŝto el brila teksaĵo, kun nazumo, tilburo, angla ĉevalo, ktp, estis subskribita de unu el la plej belaj parizaj virinoj, edzino de riĉa proprietulo, iu grafo. Kial tiu grafino subskribis bilon, leĝe senvaloran sed fakte havantan valoron; ĉar tiuj malfeliĉaj virinoj timas skandalon en sia familio, okazontan se iu el iliaj ŝuldoj ne estus pagita; ili prefere oferus sian ĉarmon, kiel kompenson. Mi volis scii pri la sekreta valoro de tiu bilo, ĉu estis stultaĵo, malsaĝeco aŭ kompatemo. La dua bilo, samvalora, subskribita de Fanja Malvaut, estis prezentita al mi de tolvendisto, kiu iris al bankroto. Neniu el tiuj, kiuj havas krediton en banko venas en mian butikon.

La unua paŝo farita de mia pordo al mia skribotablo elmontras malesperon, baldaŭan bankroton kaj precipe monrifuzon de ĉiuj bankieroj. Tial mi vidas nur cervojn sen elirvojo, ĉirkaŭitajn de la amaso de siaj kreditoroj.

Se la du virinoj ne havas pagokapablon, ili min akceptos, kiel eble plej respekte kvazaŭ mi estus ilia patro. La grafino parolos al mi afable per tiu voĉo, kies dorlotoj estas rezervataj al la pagricevonto, diros al mi karesajn vortojn, kaj mi aperos, kiel rimorso....

"Sinjorino Grafino estas en sia lito", diras la ĉambristino. "Kiam mi povos ŝin vidi?" - "Tagmeze." "Ĉu sinjorino estas malsana?" - "Ne, sinjoro, sed ŝi revenis de balo je la tria nokte." - "Mia nomo estas Gobseck; mi estos ĉi tie je tagmezo" Mi foriras signante mian ĉeeston sur la tapiŝo. Mi ŝatas lasi koton sur la tapiŝoj de la riĉuloj, ne pro malgrandanimo, sed por sentigi al ili la stampon de la Neceseco. Alvenante ĉe Fanja Malvaut, ĉe modestaspekta domo, mi puŝas malnovan pordegon kaj mi vidas unu el tiuj duonlumaj kortoj, kie la suno neniam penetras. La loĝejo de la pordisto estas malhela, la fenestro aspektas, kiel la maniko de mantelo tro longe portata: ĝi estas grasa, bruna, fendhava. " Fraŭlino Fanja Malvaut," mi demandas. " Ŝi ne estas hejme, sed se vi venas por la bilo, la mono estas tie-ĉi." - "Mi revenos", mi diris; kvankam la pordisto havis la sumon, mi volis vidi la junulinon; mi imagis ŝin beleta. Mi pasigis la matenon rigardante la gravuraĵojn prezentitajn laŭlonge de la bulvardo. Je la dekdua sono de la preĝeja horloĝo mi trairis la salonon apud la ĉambro de la grafino. " La Sinjorino tintile ĵus vokis min", diris la ĉambristino;" mi opinias, ke ŝi ne povos akcepti vin." "Mi atendos", mi respondis sidiĝante en fotelon. La persienoj estas malfermitaj; la ĉambristino rapide revenas kaj diras al mi:" Eniru, sinjoro." Laŭ ŝia voĉo-tono, mi rimarkis, ke ŝia mastrino nenion povas pagi. Kiel bela estis la virino, kiun tiam mi vidis! Sur siajn nudajn ŝultrojn ŝi haste ĵetis kaŝmiran ŝalon; en ĝi ŝi tiel bele ŝirmis sin, ke ŝiaj formoj estis tute diveneblaj. Ŝi estis vestita en negliĝo ornamita per ruŝoj blankaj kiel neĝo, elmontrantaj jaran elspezon de proksimume dumil frankoj por ilin teni freŝe gladitaj. Ŝiaj nigraj haroj dikbukle eliĝis el sub bela madraso nezorge ligita sur la kapo laŭ la kreola maniero. Ŝia lito vidigis ĥaoson okazigitan de malkvieta dormo. Pentristo estus paginta por estadi kelkan tempon meze de tiu sceno. Sub drapiroj volupte fiksitaj, kapkuseno enprofundigita en lanugan kusenegon tegitan per blua silko, kaj kies punta ornamaĵo vive kontrastis sur la lazura fono, prezentis la premon de nedifinitaj formoj, kiuj vekis la imagon. Sur larĝa felo de urso, ĉe la piedoj de la leonoj ĉizitaj en la mahagona ligno de la lito, brilis du ŝuoj el blanka sateno senzorge ĵetitaj pro la laceco kaŭzita de balo. Sur seĝo estis robo ĉife ĵetita, kies manikoj tuŝis la plankon. Strumpoj, kiujn

la plej eta blovo estus forportanta, estis dise kunvolvitaj ĉe la piedo de fotelo. Blankaj krurzonoj pendis de la dorso de fotelo. Altpreza ventumilo, duonfaldita, brilis sur la kameno. La tirkestoj estis malfermitaj. Floroj, diamantoj, gantoj, bukedo, zono kuŝis tie kaj tie. Mi enspiris parfumodoron. Ĉio estis lukso kaj malordo, beleco sen harmonio. Sed jam por ŝi aŭ por ŝia adoranto, la mizero kaŝe ekstaris montrante siajn akrajn dentojn. La laca vizaĝo de la grafino similis al tiu ĉambro dissemita de post-festaj eroj. Tiuj disaj bagatelaĵoj vekis en mi kompaton. Tiuj restaĵoj de iu amo frakasita de la rimorso, tiu bildo de malŝparo, de lukso kaj de bruo, provis rekapti la fuĝantan plezuron. Kelkaj ruĝaj makuletoj, dissemitaj sur la vizaĝo, atestis pri la fajneco de ŝia haŭto; sed ŝiaj trajtoj estis kvazaŭ ŝvel-igitaj, kaj la bruna cirklo, kiu desegniĝis sub ŝiaj okuloj ŝajnis pli forte markita ol ordinare. Tamen la naturo havis sufiĉe da energio en si mem, por ke tiuj indicoj de frenezaĵo ne difektu ŝian belon. Ŝiaj okuloj brilis. Simila al iu Herodiasa verko ŝuldita al la peniko de Leonardo de Vinĉi, ŝi estis plena de vivo kaj de forto; nenio mala en ŝia staturo nek en ŝiaj trajtoj. Ŝi inspiris amon kaj ŝajnis esti pli forta ol la amo. Ŝi plaĉiS al mi. De longe mia koro ne batis tiel. Do, jam mi estis pagita! Mi donus mil frankojn por sensaco, kiu al mi rememorigus mian junecon.

"Sinjoro", ŝi diris, prezentante al mi seĝon, "ĉu kompleze vi bonvolus atendi?" - "Ĝis morgaŭ tagmeze, sinjorino", mi respondis faldante la bilon, kiun mi prezentis al ŝi, "mi rajtos protesti nur je tiu horo" kaj en mi mem mi diris: "Pagu vian lukson, pagu por via nomo, pagu vian feliĉon. Pagu la monopolon, kiun vi ĝuas. Por protekti siajn bienojn la riĉuloj inventis tribunalojn kaj juĝistojn kaj tiun gilotinon. Sed por vi, kiu kuŝas sur kaj sub la silko, estas rimorsoj, dentaj grincadoj sub rideto, kaj buŝoj de fantastaj leonoj, kies dentoj enprofundiĝas en la koron.

"Iu protesto!* Ĉu pri tio vi pensas?" ŝi ekkriis rigardante min. " Ĉu vi havas tro malmulte da kompato rilate min?" - "Se la reĝo ŝuldus ion al mi, sinjorino, kaj ne pagus sian ŝuldon al mi, mi asignus lin ankoraŭ pli rapide ol alian debitoron." Je tiu momento mi aŭdis frapeton sur la pordo de la ĉambro. "Mi povas akcepti neniun!" firme diris la juna virino. " Anastazia, tamen necesas, ke mi vidu vin." - " Ne nun, mia kara", ŝi respondis per voĉo malpli severa, sed tamen ne



dolĉa. " Kia ŝerco! vi parolas al iu persono", respondis, enirante, viro, kiu ne povis esti iu alia ol la grafo.

La grafino min rigardis, kaj mi komprenis ŝin: ŝi fariĝis mia sklavino. Iam, kiam mi estis junulo, mi eble estis tiel stulta, ke mi ne daŭre protestus. En 1763, en Pondichery, mi kompatis virinon, kiu poste mokis min. Mi tion meritis; kial mi fidis ŝin?

" Kion volas tiu sinjoro?" demandis la grafo. Mi vidis la virinon tremeti de la kapo ĝis la piedoj; la blanka kaj sateneca haŭto fariĝis raspa: laŭ la familiara esprimo, ŝi subite havis " kokinan haŭton". Mi ridis sen ia videbla montro de miaj muskoloj.

" Tiu sinjoro estas unu el miaj komercistoj," ŝi diris. La grafo rigardis alidirekten. Mi duontiris la bilon el mia poŝo. Je tiu movo la juna virino venis al mi prezenti diamanton. " Prenu", ŝi diris, " kaj foriru!". Ni interŝanĝis la du valorajojn kaj mi eliris ŝin salutante.

La diamanto havis valoron de mil ducent frankoj. En la korto mi renkontis multajn lakeojn, kiuj brosis siajn livreojn, ciris siajn botojn aŭ zorgis pri ĉio koncernanta la luksajn veturilojn. Jen kio puŝas tiujn homojn en mian domon, mi diris al mi.. Jen kio puŝas ilin ŝteli dece milionojn, perfidi sian patrion. Por ne sin makuli irante piede, la granda sinjoro aŭ tiu, kiu lin imitas, iun tagon falos en la koton.

Je tiu momento la pordego malfermiĝis kaj la kabrioleto de la junulo, kiu prezentis al mi la bilon pasis. " Sinjoro,", mi diris al li kiam li estis elirinta el la veturilo, " jen ducent frankoj, kiujn mi vin petas redoni al Sinjorino Grafino, kaj vi informos ŝin, ke mi tenos je ŝia dispono dum ok tagoj la deponaĵon al mi konfiditan ĉi matene". Li prenis la ducent frankojn kaj ellasis mokan rideton, kvazaŭ li estus dirinta: Ha, ŝi pagis. Despli bone!

Mi vidis, laŭ tiu fizionomio, la estontecon de la grafino. Tiu blonda sinjoro, malvarmaspekta, ludanto senanima, fariĝos senhava. Li ankaŭ ŝin senhavigos, konsekvence la edzon kaj la infanojn, kies doto neniiĝos kaj okazigos en la salonoj pli da damaĝo ol baterio de Haŭbizoj en regimento.

El novelo de H. de Balzac

Tradukita de G. Prévot

Laste aperis

"Francaj kanzonoj malnovaj kaj modernaj", tradukitaj de Roger Bernard kaj Gaston Waringhien.

"Kavaliro en tigra felo" de Ŝota Rustaveli, fidela traduko de la granda 12-a jarcenta epopeo de Kartvelio.

"La Testamento", la fama klasika poemo de Taras Ŝevĉenko, la ukraina bardo.

"Glozel kaj la prahistoria skribo" de André Cherpillod; historio de la arkeologia afero de Glozelo kaj studo de la paleolitika kaj neolitika skriboj.


"Mondo de travivaĵoj", reeldono de la rakontoj de Tibor Sekelj pri la aventuroj de la verkinto dum vojaĝoj tra ekzotikaj landoj.

"Franca Antologio": grupigo en tri broŝuritaj volumoj de la specialaj literaturaj numeroj de " Franca Esperantisto " aperintaj dum pluraj jaroj. Depost la eldono aperis du pliaj tradukaĵoj: noveloj de Villiers de l'Isle-Adam, en traduko de J. Vincent, kaj "Fedra" de Racine, tradukita de G. Lagrange.

"La kormoranoj ankoraŭ ne revenis" de Nàndor Gion, tradukita de Làszlo Huszàr. Pri tiu romano J. Le Puil skribis:"Kiam ni atingas la finon de la libro, ni konscias, ke tiu romano, ja taŭga por gejunuloj, ensorĉis nin per ŝvebanta poezio, per varmega kaj leĝera etoso, per fantasto, fantazio, freŝeco kaj amo al tiuj liberaj birdoj: la Kormoranoj... Ja rejuniĝis ni!

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA KRUC-ENIGMO



NOVAJ PROBLEMOJ

Anagramoj-

El la 4 vortoj konsistantaj el 5 literoj, similaj sed malsame vicigitaj, trovu ĉiujn vortojn, helpe de la jenaj difinoj:

A) Seksa karaktero de substantivo.
B) Gramenacaj semoj panigeblaj.
C) Loĝanto en centra Afriko.
D) Nacio, lando, potenco.

Same, sed kun 2 sesliteraj vortoj:

A) Diablo.
B) Malgranda korniko.
A) Hispanrasa ŝafo.
B) Longa, mallarĝa leda strio.

Dispecigitaj vortoj-

Rekudrante ĉi-tiujn 14 vortetojn, vi restarigos sesvortan frazon, kiu estas Zamenhofa proverbo:

AS - CE - ĈE - CIĜ - FLU - IS - KO - MEN - MO - NO - PRO - SEN-SO - SO.

Ŝak-Enigmo-

lasta	TU	DOJ	MOR	DA	UR	LI	unua
	KAJ	HAR	LA	BAR	TU	OL	
	EN	POR	ŜUL	BO	HAV	AM	
	OJ	U	LA	ĈI	BO	IĜ	
	AL	DA	EDZ	SK	MO	AS	
	IĜ	EN	NON	PLI	U	NA	

Jen du proverboj. La solvo estas trovebla laŭ la movoj de la ĉevalo sur la ŝak-tabulo.

Enigmoj-

El trisilaba vorto signifanta A... forprenu la mezan ŝilabon: vi havos B.

A- Okcido de bario; B- Malagrabla frapo
A- Akvokoko; B- Mara algo
A- Lukse vivanta riĉegulo; B-Aksingo
A- Fotografilo; B- Birdokorta reĝo
A- Bazaro; B- Diversforma ringo.

LA VIVO EN GRESILLON

Komitat-kunveno de Dimanĉo 27-a de Oktobro 1991

Ĉeestis: D. Babin, P. Babin, F. Boyet, H. Boyet, B. Cheverry, P. Gémin, R. Lenel, P. Métivier, P. Naulet, J. Vincent.

Ne ĉeestis kaj senkulpiĝis: S. Bourot, P. Chevalier, G. Dairon, F. Le Magadure, G. Lagrange, R. Lloancy, S. Prevot, J.P. Bobet.

Komparo inter la ĉijaraj kaj antaŭjaraj studperiodoj-

La nombro da partoprenantoj estis proksimume la sama kaj tiu de la tranoktadoj iom supera (3109-2845) ĉar la malkresko de la ĉestantaro en julio 1991 ricevis kompenson en aŭgusto. La nombro da partoprenantoj, kiuj ĉeestis kompletajn studperiodojn denove malaltiĝis kaj iom multaj ĉeestadoj "rajdis" parte sur unu periodo, parte sur la sekvanta. Notinde estas, ke pro pli kaj pli malfrua aliĝo de la partoprenantoj, la administrado fariĝas pli malfacila. La nombro da eksterlandaj partoprenantoj iom malaltiĝis. Tio respondas al la ĝenerala konstato pri turismo en Francio ĉi jare. Nur la hispanoj kaj japanoj venis pli multnombre ol kutime.

1- Printempa periodo- Pli da partoprenintoj (45) sed la plimulto ne ĉeestis la tutan studperiodon.

2- Junia periodo- Proksimume samnombra ĉeestantaro, kiel kutime (35), sed iom malpli da eksterlandanoj.

3- Unua semajno de julio- Nur 28 personoj ĉeestis, verŝajne pro tio, ke la francaj lernajaj ferioj komenciĝis nur la 9-an.

4- Studperiodo de 9-a ĝis 22-a de julio- Iom malpli da partoprenantoj ol dum la sama periodo la antaŭan jaron: nur 52 kaj la prelegoj ne ricevis la meritita ĉeestantaron. La veno de la regiona televido FR3 kaj ĉefe de la Svisa televido dum pluraj tagoj iom ĝenis la disvolviĝon de la periodo. Aliflanke la vizito de la televidraportistoj alportis novan nekonatan etoson.

5-Studperiodo de la 23-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto- Kvankam samtempe okazis Internaciaj Kongresoj ĉeestis 58 personoj. Ĉiuj kursoj, ĉefe tiu pri traduk-arto, estis interesplene vizitataj.

6- Studperiodo de la 6-a ĝis la 19-a de aŭgusto- Ĉijare tiu periodo akceptis 75 personojn. Sed nur parto el ili ĉeestis la tutan periodon.

7- Studperiodo de la 20-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro- La daŭro de la ĉeesto de la anoncitaj Bulgaroj (19) mallongiĝis pro miskompreno de la tarifoj fare de, fakte ne-esperantistaj organizantoj: konfuzo inter taga kaj semajna prezo!

La provizora financa raporto montras ĝeneralan malaltiĝon de la enspezoj ĉar pli multe da familioj, tendumantoj, tranoktantoj en komunaj ĉambroj, do personoj pagantaj pli malaltan tagan tarifon, ĉeestis. Tamen laŭ financa vidpunkto la jaro entute estis sufiĉe sukcesa; bedaŭrinde oni petas de ni pagon de 60 000 f. pro TVA. Kompreneble ni diskutas kaj esperas, ke la nova leĝo, kiu aperis intertempe kaj estas pli favora al la asocioj, efektiviĝos.

Protokolis: P. Naulet

LIBRO-SERVO

Kial ne donaci libron okaze de la nova jaro? Ekzemple:
al studemuloj: " La danĝera lingvo ";
al poeziamanto: "Esperanta antologio";
al ĉiuj: Piron- aŭ Valano-aĵon.

La katalmogo de nia libro-servo proponas vastan elekteblecon. Vi deziras perfektiĝi, vi konas iun, kiu volonte eklernus Esperanto sed vi ne povas viziti la lokan kurson. Pensu pri la perkorespond kursoj. Gresillon disponigas 3 nivelojn.

Vi ricevos la supremenciitan katalogon, informojn pri la perkorespondaj kursoj, prefere kontraŭ poŝtmarko, de

S-ino Vincent, 26 bis Rue de Milngavie, 49150-BAUGE.
tel. 41 89 29 47

Niaj perkorespondaj kursoj

Por komencantoj: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj

La prezo de tiu kurso estas: 200 f.f.

Por praktikantoj: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkigoj, taskoj sendotaj por korektado.

La prezo de tiu kurso estas: 200 f.f.

Supera kurso: de- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri KApableco.

Prezo de la kurso: 150 f.f.

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

esperantigis R. DUPUIS

bonega traduko de ĉefverko

Prezo : 36,00 FF

GRAMATIKO PER BONHUMORO

La Substantivaj sufiksoj « AR » kaj « ER »

AR : esprimas kolekton da **samspecaj** ekzistaĵoj formantaj **tuton.**
ER : esprimas **unu** el la konsistigaj **elementoj de tutaĵo.**
(arbaro, demandaro, neĝero, panero).
(uzado, kiel radikoj : arigi dokumentojn, diserigi panpecon, seka kuko diseriĝas)

ERO DE ARO ESTAS UNUO

RIMARKOJ :

1) Por esprimi nur okazan kolektivon oni simple uzas :
Aro da, kelke da, grupo da, multe da :
« Mi ellernis aron da vortoj (ne vortaron) ».
« Tie kuŝas aro da dehakitaj arboj (ne arbaro) ».

2) Anstataŭ « ER » oni ofte uzas pli precizajn vortojn : parto, peco, guto, floko, atomo.



Ŝajnas, sinjorino, Ke baldaŭ la tuta papiliaro staros sur via ĉapelo.



Rapidu, mi petas ! La pluveroj englitas en miajn manikojn !



Profitu la rabaton por jam aĉeti la bebo-vestaron !

Niaj perantoj

Aûstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aûstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aû 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F - 49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.P.P.A.P. 71.404 Le Gérant : P. BABIN